

Bob Dylan ,

Kiom da mono elspezas la
mond'

tradukita de Joachim Gießner

Kiom da mono elspezas la mond'
por bomboj, raketoj kaj mort'?
Multaj sin gloras, paradas per bus',
sufer' nek mildiĝas nek sort'.

Kiom okazu ankoraŭ mizer',
ĝis venos por savo la vort'.?
Respondas, amik', tutsole nur la vent',
respondas tutsole nur la vent'.

Kiom da vojoj en tuta la mond'
abundas per larmoj, sufer'?
Kaj oceanoj ĝis mara profund'
plenplenas per trista mizer'!

Kiom da inoj dum tutsola viv'
atendas en vea toler'?
Respondas, amik', tutsole nur la vent',
respondas tutsole nur la vent'.

Kiom da homoj en malliberec'
sopiras la ŝanĝon de l' stat'?
Kaj geinfanoj milionoj dum nokt'
ne dormas pro morda malsat'!

Kiom da homoj noktpetas en rev':
"Ho venu al ni bonas fat'!"
Respondas, amik', tutsole nur la vent',
respondas tutsole nur la vent'.

...

Bob Dylan ,

Kiom da mono elspezas la hom'

tradukita de Manfred Retzlaff

Kiom da mono elspezas la hom'
Por la armilar' sur la ter'? -
Kaj kiom da vortoj diras de li?
Kaj ne malpliĝas mizer'!

Ĉu devos okazi la lasta milit'
Kun neimagebla mizer'?
Respondon, amik', ja scias nur la vent',
Repondon ja scias nur la vent'.

Kiom da stratoj sur tiu ĉi ter'
Kondukas al senesperec'? -
Kaj tiom da maroj en tiu ĉi mond'
Plenplenas de plor' kaj tristec'? -

Kaj kiom da inoj atendas, ho ve,
Kaj restas en tia solec'?
Respondon, amik', ja scias nur la vent',
Repondon ja scias nur la vent'.

Kiom da homoj en malliberec'
Suferas nur pro opini'? -
Kaj kiom da homaj infanoj, ho jes,
Malsatas sur ter tiu ĉi?

Kaj kial la revoj sur pac' sur al ter'
Ne efektiviĝas sur ĝi?
Respondon, amik', ja scias nur la vent',
Repondon ja scias nur la vent'.

...

*Traduko de la Angla poemo "Blowin' in the Wind" de BOB DYLAN (civila nomo: Robert Allen Zimmermann, *1941-05-24) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-720-1449 (2012-12-11 09:50:59)

Troveblas tiu ĉi esperantigo de la kanto-teksto en <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf> sub <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. Pri Joachim Gießner vidu la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_Gie% C3% 9Fner](http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_Gie%C3%9Fner).

*Traduko de la Angla poemo "Blowin' in the Wind" de BOB DYLAN (civila nomo: Robert Allen Zimmermann, *1941-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984-04-29.*

MR-148-1 / Arg-720-1447 (2012-12-11 09:05:35)

La melodio de tiu ĉi kanto, kiun verkis la aŭtoro Bob Dylan (civila nomo: Robert Allen Zimmermann) ankaŭ, aŭdeblas en <http://www.youtube.com/watch?v=tG08snK98l0>. Pri la muziknotoj vidu: <http://de.scribd.com/doc/9589786/Bob-Dylan-Blowin-in-the-wind-notes>.